

# EKO 2021

## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok  
jaroj, de post 2013  
2020: rekorda jaro:  
kun 60 komunikoj  
Subtene al la loka,  
landa, faka kaj  
regiona agado

EKO 2021-42 sendita el Budapeŝto la 29-an de septembro

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## La nov-jorka oficejo de UEA komunikas fidele

Ĝi de jaroj produktas trilingvan informilon (Esperante, angle, france).

### Numero 54 – septembro -oktobro 2021

- UNESKO salutis la mondan kongreson de Esperanto
- La Asocio emfazas la gravecon de indiĝenaj lingvoj
- Organizo de la Esperanto-junularo esprimas sin je Junulara Tago
- Nova numero de la *UNESKO-Kuriero* aperis en Esperanto
- Lingvo, Konflikto kaj Sekureco
- Prezidanto de la Brazila Beletristika Akademio aldoniĝis al la Honoraj Patronoj de UEA
- Internacia Tago de Esperanto estas proponata al UNESKO
- Rifuĝintoj kaj lingvo: UEA alfrontas mondan problemon
- UEA intervenas pri lingvo kaj edukado

Ni alkroĉas la version en Esperanto al nia sendaĵo.



La kuriero estas elŝutebla de la retejo de UEA, kiu direktas vin al la retejo de Unesko por ke ili registru vian elŝuton. Tie vi povos elŝuti unuopajn artikolojn aŭ la tutan 57-paĝan revuon.

Servo subtenata de  
Universala  
Esperanto-Asocio  
kaj Internacia Ligo  
de Esperantistaj  
Instruistoj



Helpantoj:  
Rob Moerbeek  
Gbeglo Koffi  
Francois  
Lo Jacomo

**ENHAVO**

- Informilo pri UN
- Indekso por IPR
- Litovoj en Kaunas
- Marianne Vermaas
- Kvinpetalo invitas

## Indekso por IPR pretigita

La oficiala organo de ILEI, *Internacia Pedagogia Revuo*, jam de ĉ. tridek jaroj eldonas kvinjarajn indeksojn pri la revua enhavo. Nun ĝi pretigis 15-jaran resumon.

Ekde la numero 2004/4 ĝis la numero 2020/4 en la arkivo oni povas trovi la PDF-versiojn de IPR. En la kazo de la jaroj 1995 ĝis 2004 oni povas legi aŭ parton de la artikoloj, aŭ trovi la enhavtabelon:

[https://www.ilei.info/ipr/malnovaj\\_numeroj.htm](https://www.ilei.info/ipr/malnovaj_numeroj.htm)

Jozefo Nemet

## Litovoj kune en Kaunas

Litova Esperanto-Asocio informas, ke la 56-a kongreso de Litova Esperanto-Asocio okazos la 11-an de decembro 2021, en Kaunas. Samloke post la kongreso la 11an kaj 12-an de decembro 2021, okazos la ĉiujara tradicia aranĝo de litoviaj esperantistoj "Zamenhof-Tagoj-2021". Pli detalaj informoj pri ambaŭ aranĝoj aperos iom poste. Bonvolu sciigi pri tio ĉiujn konatajn esperantistojn. Ĉiujn aktualajn informojn pri BET-56 liveras ankaŭ la Eventa Servo de UEA:

<https://eventaservo.org/e/BET-56>

Povilas JEGOROVAS, Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

## Memore al la multjara direktoro de CO

La 23-an de septembro pasis la 110-a datreveno de la naskiĝo kaj la 30-a de la forpaso de Marianne H. Vermaas, unu el la elstaraj nomoj en la historio de UEA post la 2-a mondmilito. Okaze de la datreveno mi verkis artikolon pri ŝi por *La Ondo de Esperanto*:

<https://sezonoj.ru/2021/09/vermaas>

Osmo Buller

La foto montras f-inon Vermaas kun d-ro Ivo Lapenna kaj la UN-subsekretario Narasimhan ĉe la transdono de la peticio de UEA al UN en Novjorko, la 6-an de oktobro 1966.





## Alvoko por la Kongresa Universitato

Kadre de la 107-a UK en Montrealo okazos la 75-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). UEA invitas proponojn pri IKU-prelegoj, kiuj estu sendataj al la IKU-sekretario ([amri@huji.ac.il](mailto:amri@huji.ac.il)) plej laste la **31-an de januaro 2022**. Estas planate organizi la Montrealan UK hibride, do ankaŭ la IKU-AIS-prelegoj povas esti ĉeestaj aŭ virtualaj. La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto – sume ne pli ol unu paĝon. La proponoj estos profesie prijuĝitaj de la IKU-komisiono. Tiuj kiuj ne estos elektitaj por la IKU, povos tamen esti konsiderataj por la Scienca Kafejo. Ĉiu preleganto

devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Akceptita IKU-prelego estos rekompencita per honorario de 240 EUR. Por IKU-AIS-kurso la honorario estos 300 EUR kaj por Scienca Kafejo – 120 EUR. Duono de la honorario dependas de ĝustatempa livero de la teksto por la IKU-libro kaj duono de la fizika prezentado de la prelego. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumoj troviĝas en la retejo de IKU: [uea.org/kongresoj/universitato](http://uea.org/kongresoj/universitato).

## Kvinpetalo invitas oktobrofine

<p>Oktobro 25a-29a</p>	<p style="text-align: center;"><b>Trianivelaj studoj</b></p> <p>Al tiuj, kiuj jam iom regas la lingvon, ni proponas iom da enprofundiĝo en la kulturo esperanta. Temas pri la studprogramo de la triagrada ekzameno <a href="#">Atesto pri Supera Lernado</a> de Franca Esperanto-Instituto.</p> <p>Dum kvin tagoj ni iom studos la librojn preskribitajn por tiu ekzameno kaj faros aliajn lingvajn ekzercojn.</p> <p>Kaj la tuto estos certe interesa ankaŭ por tiuj, kiuj ne celas al la ekzameno, sed deziras plibonigi sian praktikon de la lingvo kaj vastigi sian konon de la Esperanto-kulturo.</p>	<p style="text-align: center;"><b>Brian Moon</b></p> 
<p>Oktobro 25a-29a</p>	<p style="text-align: center;"><b>Praktikado de la lingvo (dua-grada)</b></p> <p>Babilado, redaktado de tekstoj, ktp. (vd ĉi supre)</p> <p>Kun Catherine Kremer, profesia ĉiĉeronino.</p> <p>Diversaj temoj laŭ la grupo : turismo, historio, gvidado, ludoj... kaj familiaj anekdotoj.</p> <p>Kunportu dokumentojn pri via regiono, fotojn aŭ tekstojn, leterojn ligitajn al via familio, ktp.</p>	<p style="text-align: center;"><b>Catherine Kremer</b></p> 

Pliaj informoj: KVINPETALO Esperanto-Centro

- Akceptejo : 4 rue du Bureau, F-86410 BOURESSE
- Telefono : 33 (0) 549 034 314 aŭ 33 (0) 607 316 781 (provizora poŝtelefono)
- Poŝte : 15 rue du Lavoir, F-86410 BOURESSE
- Retpoŝte : informoj @ kvinpetalo.org.
- Reteje: <http://www.kvinpetalo.org/> (Esperante kaj france)

===== vortoj: 820 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de post 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.